La aŭtoro de ĉi tiu libro estis hungara studento kaj li studis en japana universitato je la komenco de la okdekaj jaroj. Poste li prelegis en diversaj sciencaj konferencoj kaj universitatoj en Pekino kaj Kantono. Pri siaj travivaĵoj kaj spertoj li verkis multajn artikolojn por diversaj eŭropaj kaj aziaj ĵurnaloj. Tiuj verketoj estas reaperigitaj en la unua parto de ĉi tiu libroserio kun la titolo „*Ruĝa suno kaj verda stelo*”. Per tiuj verketoj la legantoj komprenas kiel eŭropano fartis en la ekzotikaj orientaziaj landoj kaj kiel li vidis la socian vivon en la tiama Ĉinio.

Dum la lastaj jardekoj ankaŭ mi laboris en diversaj aziaj landoj kiel diplomato. Tiel mi bone komprenis, ke la studado de la aziaj lingvoj efike helpas la homojn por kompreni la pensmanieron kaj la vivmanieron de la aziaj popoloj. Dum sia studprogramo en Japanio Márkus Gábor sukcese studis ne nur la parolatan japanan lingvon sed ankaŭ la komplikan ĉinan skribosistemon. Pro tio li pli profunde komprenis la malnovan riĉan kaj valoran kulturan tradicion de la orienta mondo, ol la eŭropaj kaj amerikaj turistoj kiuj nuntempe amase vizitas tiujn interesajn kaj ekzotikajn landojn.

Post tridek jaroj Márkus Gábor revojaĝis al Azio kaj vizitis, Vjetnamion kaj Ĉinion, la rapide evoluantajn landojn de Sudorienta Azio. En ĉi tiu libro li verkas pri siaj novaj spertoj. Tiuj verketoj havas multkolorajn vojaĝraportojn, interesajn informojn pri la historio, kulturo, ekonomio, arto, religio kaj la socia vivo de Sudorienta Azio. La aŭtoro tre ofte komparas la eŭropan kaj la azian situacion kaj laŭ profunda analizo konkludas, kiel ekonomia kaj socia krizo estis en multaj okcidentaj landoj, kiam en Sudorienta Azio, ĉefe en Ĉinio oni konstruis samtempe riĉajn kaj rapide evoluantajn modernajn sociojn konservante ankaŭ la tradiciojn.




Dr. Nanovfszky György
ambasadoro de Hungario en urboj
Moskva, Jerevan, Tbilisi, Baku,Taskent,
Ashabad kaj Singapur

ISBN 978-963-08-5553-2

Dr. Márkus Gábor SUDORIENTAZIAJ VOJAĜOJ

Dr. Márkus Gábor

# SUDORIENTAZIAJ VOJAĜOJ




**ESPERANTLINGVE ĈIRKAŬ LA MONDO**